

ESPERO KATOLIKA



Sonoriloj enkondukas la Novan Jaron

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Januaro 1961

Jarkolekto 58 No. 509

ESPERO KATOLIKA

Fondita de Pastro Emile Peltier, Tours (Francujo) en 1903.
Oficiala Organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
fondita de Pastro Richardson en 1910 en Parizo.

Prezidanto: sac. A. Beckers, paroĥestro, KWAADMECHELEN - L. (Belgujo)

Redakcio kaj Administracio: F-ino Truus Durenkamp,
Frederikstraat 2, DORDRECHT (Nederlando) Poŝtkonto 214009.



ARABONO: Ned. guld. 6,00 aŭ egalvaloro, pagebla al jenaj landaj

REPREZENTANTOJ:

- Argentino:** S-ro W. Przewolka, Cas.de Correo 2914, BUENOS AIRES
- Aŭstralio:** S-ro V. J. Timmins, 73 Alexandria Parade, HORNSBY N.S.W. 15 ŝil.
- Aŭstrujo:** S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, WIEN III-40, p.k. 105.713 40 ŝil.
- Belgujo:** S-ro H. Vermuyten, Albertstr. 16, ANTWERPEN p.k. 207606 80 frs.
- Brazila Resp.** B. E. L., Praça da República 54, 1º, RIO DE JANEIRO
Kanoniko Is. Lagares, C. Postal 34, UBERABA, M.G.
- Brita Imperio:** S-ro N.W. Vigar, 28 Franklands Drive, ADDLESTONE,
Surrey, Anglujo, 12 ŝil.
- Francujo:** S-ro Pierre Muffang, 14bis Avenue Galois,
BOURG-LA-REINE (Seine) p.k. Paris 224-82. 8,25 NF.
- Germanujo:** S-ro Hans Stahl, Pestalozzistr. 4/1,
(13a) WEIDEN (Oberpf.) p.k. Nürnberg 634.33 6,75 DM.
- Hispanujo:** S-ro Franc. Tur Riera, C. San Carlos 6, IBIZA (Balears) 95 pes.
- Irlando:** S-ro Lorcán O'hUiginn, 8 Cypress Rd. Mt. MERRION, Co. Dublin.
- Italujo:** U.E.C.I., Viale dei Mille 37,
MILANO, pk. 3/7791 C. C. Ferrari, 1100 lire
- Japanujo:** F-ino D-ro Ĉisato Jamagata, 2-5 Otaki-Cho, YOKOSUKA 600 Yen.
- Jugoslavio:** Resp. Patro Lovro Kiš o.f.m. M. Tita 7, KARLOVAC.
- Kanado:** S-ro C. R. MacDonald, 9445 Millen Avenue,
MONTREAL 12, P.Q. 2,— dol.
- Nederlando:** Kasisto Nederlanda Katoliko, Nieuwstraat 28,
BOSKOOP p.k. 121449 f 6,—
- Nov-Zelando:** Dro J. Hamvai, 33 Arran St. Avondale, AUCKLAND 12 ŝil.
- Polujo:** S-ro Antono Zoglowek, ROZA WIELKA, pow. Walcz. 130 zlot.
- Portugalujo:** S-ro Alfredo L. Sales, Bairro Olhavas, Prédio Nunes, LEIRIA 48 esk.
- Svisujo:** S-ro W. Flammer, paroĥestro, Zürchersmühle A.R. fr. 7,—
- Urugvajo:** D-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Flor.)
- Usono:** S-ino Wm. McGrogan, 2109 Parkwood Drive. N.W.
WARREN, Ohio. U.S.A. 2,— dol.

La nomita kotizo validas por membreco de I.K.U.E. inkluzive abonon je ESPERO KATOLIKA. Novaj membroj bonvolu krompagi unufoje 5% de la jarkotizo por kostoj de adreskliŝo, membrokarto ktp. Adresŝanĝintoj informu tuj la reprezentanton aŭ nian Administracion, aldonante respondkuponon por la nova adreskliŝo.



ESPERO KATOLIKA



NOVJARA SALUTO DE LA PREZIDANTO.

Okaze de la nova jaro mi deziras al ĉiuj legantoj de „Espero Katolika” kaj al ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo sanktan kaj feliĉan novjaron.

La ĵus mortinta jaro estis por IKUE granda sukceso. La membraro de IKUE grandskale kreskis dank’ al la tre lerta gvidado de nia monata revuo: nia redaktorino meritas pro tio niajn elkorajn gratulojn. La IKUE-kongreso kune kun la Eŭkaristia kongreso en Munkeno tiris la atenton de multegaj ne-esperantistaj partoprenantoj de la Eŭkaristia kongreso: la Ekleziaj aŭtoritatoj multe laŭdis nian aktivecon.

La ideo: Esperanto kiel dua lingvo por ĉiu homo ĉiam pli kaj pli aperas en la publika opinio. Jam en multaj landoj oni parolas pri la enkonduko de Esperanto kiel deviga fakto en la mezgradaj kaj ankaŭ en la elementaj lernejoj. Pli kaj pli Esperanto aperas en la publikaj grandpotencoj: laste „The Voice of America” aldonis al sia longa listo ankaŭ Esperanton.

Jes, ni povas konkludi ke la lingvo Esperanto estas konata socia fakto en la nuntempa mondo.

Tio signifas por ni katolikoj, ke tiuj faktoj estas granda kuraĝigilo por daŭrigi en nia laboro. Tiun entuziasmon mi deziras al ĉiuj dum la venonta jaro.

Al ĉiuj mi deziras fruktodonan sukceson en la entreprenoj dum la venonta jaro kaj pacon en la mondo.

Nom^o de la IKUE estraro:

A. BECKERS,
prezidanto.

La Prezidanto de IKUE kaj la redaktorino de **Espero Katolika** tutkore dankas pro la multnombraj bondeziroj por Kristnasko kaj Novjaro, kaj deziras al ĉiuj membroj de IKUE, resp. legantoj de nia revuo

FELIĈAN KAJ GRACOPLENAN JARON 1961.

KARAJ LEGANTOJ

En la lastaj tagoj de ĉiu jaro kaj la unuaj de la nova jaro ni kutimas fari la bilancon: ni ne nur esprimas en ĉifroj la materian rezultaton de nia laboro, sed ankaŭ kaj precipe meditas pri la stato de nia interna vivo, persona kaj unuiĝa. Pri la pasinta jaro vi ĝenerale scias, kiel ĝi estis por nia IKUE: ĉiumonate mi raportis en nia revuo kaj klopodis doni skizon de nia situo. La financa rezultato aperos en nia jarlibro 1961: mi esperas ke ĝi povos aperi kun la februara numero de E.K., sed ne povas vere promesi tion, ĉar ĝi postulas multegan laboron, kaj jam la ordinaraj taskoj, krom mia plena profesia laboro, estas tro ampleksaj por unu persono. Mi tial denove petas la helpon de ĉiuj vere bonaj esperantistoj inter vi, por ensendi interesajn artikolojn por nia revuo. Tamen bonvolu skribi klare, prefere maŝine kaj kun spaco inter la linioj, tiel ke mi ne bezonos transkribi ilin por ke la presisto povu legi ĉion. Komencantoj kaj tiuj kiuj ne majstras la lingvon, antaŭe korektigu siajn eventualajn artikolojn fare de bona esperantisto aŭ dum klubvespero, por „lerni de la eraroj”; kelkfoje oni plendas, ke iu artikolo ne baldaŭ aperas, sed oni devas kompreni, ke eĉ se temas pri interesa artikolo kiu meritas lokon en nia revuo, ĝi ofte devas atendi dum monatoj, ĉar la korekto kaj transskribo de tiaj kriplaj lingvo kaj stilo postulas multan tempon, kiu ja tute mankas al mi.

La novan jaron ni komencas kun zorgoj: mi jam raportis pri la malbona stato en kelkaj orienteŭropaj landoj, kie nia revuo, kvankam politike absolute neŭtrala, momente ne povas enpenetri, evidente pro sia katolika karaktero, malgraŭ la asertoj de la aŭtoritatuloj de tiuj landoj, ke la religio estas tute libera: povas esti ke etaj oficistoj ĉe dogano aŭ poŝto ne scias pri tiu sinteno de siaj ŝtatestroj aŭ kontraŭas ĝin, sed la fakto restas ke E.K., eĉ en registritaj pakajoj, malaperas. Ni tre bedaŭras tion por niaj koncernaj gefratoj, kiuj sopire atendas la alvenon de nia revuo, kaj esperas baldaŭan pli bonan situon.

Denove mi devis forigi ĉ. 30 membrojn, kiuj post ripetitaj admonoj ne pagis sian kotizon por 1959 kaj 1960; aliaj, kiuj ĝis nun ne pagis por 1960, baldaŭ sekvos. Bedaŭrinde aro da membroj propravole ekŝiĝis pro diversaj kialoj. Feliĉe ni ankaŭ povis noti nombron da novaj membroj, sed ni bezonos almenaŭ 200 novajn abonantojn por anstataŭi la entute perditajn.

Mi tamen ne estas pesimista: multaj el vi montris kortuŝan fidelecon en la subteno de nia afero, pagante anstataŭajn kotizojn, aŭ por personoj en nepagipovaj landoj kie E. K. estas allasata; varbante novajn membrojn, sendante kuraĝigajn leterojn, ktp. Sinceran dankon al ĉiuj fideluloj!

Mi esperas, ke la aldono de la Evangelioj plaĉos al multaj kaj altiros multajn novajn abonantojn: nia kotizo estas tre malalta, kaj ni nur petas libervolan etan alpagon por la kostoj kaj ankaŭ por la grandaj elspezoj de nia jarlibro, kiu estos pli ampleksa ol la antaŭa kaj necesigos duoblan afrankon. Pripensu tion pagante vian kotizon! Jam granda nombro da membroj pagis sian kotizon por 1961: mi petas al la ceteraj, ke ili tuj faru tion, por ke mi ne bezonu perdi multajn horojn por elserĉi la forgesemulojn kaj sendi al ili pagmemorigilojn. *Via* tasko nur estas la sendo de la kotizo, la ceteron volonte faros mi, sed helpu min por iom malpezigi mian taskon!

Mi deziras al vi ĉiuj, al viaj familianoj kaj parencoj, la benon de Dio por la nova jarro!

Truus Durenkamp.

La 29-a IKUE-kongreso 1962 apud Romo.

Ni eksciis el Romo, ke la LKK estas elektita: la venontan monaton ni publikigos la nomojn de la funkciuloj kaj se eble foton.

Kutime nia kongreso okazas tuj antaŭ la Universala Kongreso, tiel ke oni laŭdezire povos ĉeesti ambaŭ. Ĝis nun UEA ne scias la precizan daton, nek la lokon por sia kongreso en 1962 kaj do ni ankaŭ ne povas fiksi nian. Tamen, de diversaj flankoj oni petis nin, ke nia kongreso okazu en aŭgusto, ĉar en la fino de julio multaj geinstruistoj ktp. ankoraŭ ne havas libertempon. Ni do decidis kongresi post UEA, do proksimume komencante ĉirkaŭ la 15-an de aŭgusto. La LKK konsentis: ĉar nia kongresejo estas situata en la montaro, apud lago, tuj ekster Romo, eventuala varmeĝo ne ĝenos nin.

La Internacia Centro Pio XII por pli bona Mondo disponas pri 100 ĉambroj unu-litaj kaj 50 ĉambroj du-litaj. La prezo por kompleta pensio estas 1800 liroj tage por ĉiu persono (10,80 ned. gld. = ĉ. 44 steloj).

Aliĝilojn ni presigos poste; ni jam povas sciigi, ke la aliĝkostoj dependos kiel kutime de la dato de aliĝo, kaj varias de 2500 - 3500 liroj. Akompananta edz(in)o de kongresano, gejunuloj malpli ol 20 jaroj kaj blinduloj pagos la duonan kotizon. Cetere estas sufiĉe da loko apud la kongresejo por tiuj kiuj volas starigi siajn tendojn. Tio precipe plaĉos al la junularo, kiu havos siajn proprajn kunvenojn en la kadro de la IKUE-kongreso, kaj en la sama kongresejo. Nia junularsekcio „La Alta Flugo” certe publikigos detalojn en sia revuo „Birdo” kaj ankaŭ ensendos ilin al E. K.

Ni eksciis ke la Itala Esperanto-Federacio, kiu kutime kongresas en septembro, ankaŭ volas aranĝi la datojn laŭ nia kongreso, tiel ke ili kongresos tuj post IKUE aŭ samtempe, kaj multaj personoj povos partopreni ambaŭ.

Ni esperas baldaŭ povi publikigi pliajn detalojn, sed esperas ke ĉi supraj komunikoj jam estas valoraj por multaj el vi, kiuj longe antaŭe devas fari siajn vojaĝplanojn.

AL LA NOVA JARO

Nova Jaro
Al homaro
Kion portas?
Malfeliĉon
Ĉu feliĉon
Al ni sortas?

Kiom foje
Ni kun ĝojo
Vin atendis,
La esperon
Pri prospero
Al vi sendis.

Sed vi flugis
Kaj forflugis
Kiel vento;
En la koro
Rememora
Restis sento.

Nun denove
La malnova
Esper' en ni vekiĝas,
K' en ĉi jaro
Al homaro
La feliĉ tagiĝas...

31.XII.1960. J.Z. Polujo

LA PREĜO DE MADIA KAFUMBE

Ho Patrino, mi estas via filino. Aŭskultu min!
Mi tiom ĝojas paroli al Vi,
malfermi al Vi mian koron.
Vi aŭskultos min, ĉu ne?
Vi aŭskultos min senlace.
Lerneje, kiam mi tro babilas, oni riproĉas min:
„Silentu vi, babilemulino!”
kaj mia patrino forpelas min el la kabano,
ĉar ŝi diras, ke mi vekas la dormantajn fratinojn.
Vi anstataŭ ridetas al mi: sufiĉe!
Ĉu Vi scias? Mi ĉiam sonĝis patrinon kiel Vi:
niaj afrikaj patrinoj estas bonaj, jes,
sed ili havas tiom da pensoj, tiom da penoj
kun tiuj pezaj infanoj surdorse, kaj grandaj korboj surkape...
Pro tio ili ne havas tro da tempo por aŭskulti nin.
Vi anstataŭ estas tute nia,
ankoraŭ pli nia, de ni afrikanoj, ŝajnas al mi,
ol de ĉiuj aliaj infanoj de la mondo.
Ne aŭskultu ilin, se ili protestos:
bone mi scias, ke mi pravas!
Antaŭ ĉio, ĉu Vi ne venis rifuĝi inter ni,
kiam oni forpelis Vin el via lando kun Jesuo Infano?
Vi estus povinta eliri Norden,
aŭ Orienten aŭ Okcidenten:
Vi anstataŭ iris la Sudan vojon
kaj elektis Afrikon, mian Afrikon;
kaj kiam vi kuiradis,
Vi kaŭradis surtere ĉe ligna fajreto,
ĉe bakitargila poteto, kiel faras ni!
Kaj kiam vi deziris iom da akvo,
Vi ne havis brilan kranon,
sed vi iris al la fontano,
kaj reiris kantante,
kun la amforo surkape... kiel ni:
kaj kiam Jozefo estis senlabora,
ankaŭ Vi eble suferis malsaton, kiel ni.
Pro tio Vi devas tiel bone kompreni
kiom ni bezonas Vin:
kiel la aliaj... pli ol la aliaj, eble.
Ni bezonas Vian ĝojon,
tiel malsama ol tiu senbrida
de niaj dancoj, kiuj daŭras dum tutaj noktoj.
Via ĝojo naskiĝas de la servo, de la sinforĝeso;
Ni bezonas Vian ekzemplon,
kaj ankoraŭ ni bezonos ĝin iutage
kiam ankaŭ ni fariĝos panjoj...
Igu, ke ni ne estu kiel tiom da aliaj,
patrinoj nur de la korpoj,

sed vere patrinoj ankaŭ de la animo de niaj gefiloj,
por fari el ili virojn kaj virinojn indajn je nia Afriko,
Je Via Filo Jesuo.

Ni precipe soifas vian ĉastecon.

Ho Patrino, se Vi sciis kiel malfacile estas,
en nia fajra Afriko!

Dum tiom multaj aliulinoj glitas ĉirkaŭe de ni,
kaj ĉiuj ŝovas nin malsupren,
tiam, precipe, ho Patrino, protektu nin.

Vi scias: Afriko estas arda lando,
arda pro amo, arda pro malamo,
arda pro kantoj pro dancoj,
arda ankaŭ pro ĉagrenoj,
pro pekoj kaj pasioj.

Flanke de Vi ni estas bonstataj,
Via freŝeco faros nin ĉastaj,
Via dolĉeco faros nin bonaj.

Ho Virgulino Maria, mia koro estas plena je deziroj
kaj ankaŭ mia lando!

Ho Patrino de Jesuo, kolektu ilin ĉivespere,
Ho Patrino de nia Afriko!

Nun ŝajnas al mi ke mi ĝuste diris al Vi ĉion!

El la misia revuo „IL MASSAIA” de Romo, majo 1960.

esperantigis Alberto Jemmi

Nia flago

Kun granda ĝojo ni ĉeestis la benadon de la nova flago, kiun nia IKUE okaze de ĝia 50-jara jubileo ricevis.

En tiu momento niaj pensoj reiris al la soleno en la jaro 1933 dum la granda Ĝenerala Katolika Kongreso (*Katholikentag*), kiam la flago de *AKLE, Vieno*, estis benata de la IKUE-prezidanto *sac. Font Giralt*, mortinta kelkajn jarojn poste kiel martiro dum la enlanda milito hispana.

De 1938 - 1945 tiu historie signifa flago troviĝis bone gardita en la Viena Ĉefdioceza Muzeo.

En 1952, je la Tutaŭstria Katolika Kongreso (*Katholikentag*) ĝi ree inde „aperis”; same dum la IKUE-Kongreso 1958 kaj okaze de la soleno pro la ora sacerdota jubileo de *komandoro Patro Georg Plank O.Cr.*, la 17an de julio 1960.

La en 1933 dediĉita poemo *Nia Flago* certe validas ankaŭ nuntempe:

Flirtu kara flago, ligsimbolo,
Flirtu por la kredo kaj esper'!
Ariĝanta ĉirkaŭ vi popolo
Al vi sekvas vigle kun fier'.
Ĝi promesas jen kun firma volo
Fidelecon al la lig-afero.
Flirtu flag', ne signo sangmilita,
Sed gvidil' en pac-batal' spirita!

Flirtu flag' por Kristo nia reĝo
Kaj por Lia Dia imperi',
Kie am' kristana ĉefa leĝo
Kaj la civitanoj estu ni!
Suprenonu la komuna preĝo
Same por la pap' kaj eklezi'!
Flirtu flago kun la kruc' en stelo:
Gvidu nin al vere sankta celo!

Walter Mudrak, Vieno.

LA HEROA MORTO DE HUNGARA EPISKOPO.

En 1945, post la fino de la dua mondmilito amasiĝis tiom da doloroj, kruelajoj kaj tragedioj, ke la mondo tiutempe ne kapablis plene kompreni kaj inde taksi la heroecon de la episkopo Vilhelmo APOR, kiu oferis sian vivon por protekti la ĉastecon de virinoj, rifuĝintaj en la episkopan palacon.

La rusa armeo atingis la regionon de Győr. La batalo pri la urbo daŭris 3 tagojn ĝis Sankta Vendredo.

La episkopo kune kun 300 rifuĝintoj, — precipe virinoj kaj knabinoj, — en la kelo maldormis preĝante. Je Sankta Vendredo li laŭte legis la PASIONON.

La batalbruo iom post iom mallaŭtiĝinte ĉesis, kaj la episkopo jam komencis esperi, ke la kriza fazo de la peza provo jam pasis, sed subite sin anoncis ses rusaj soldatoj por fortreni la knabinojn, kiujn ili jam antaŭtagmeze perokule elektis por si.

Post preskaŭ duhora kontraŭstaro la soldatoj pelis la episkopon malsupren en la kelon. Tri soldatoj gardis per maŝinpistoloj la elir-pordon. La aliaj tri traserĉis la lokojn por trovi la sinkaŝantajn knabinojn.

La episkopo aŭdante la timkriojn de la knabinoj, suprenrapidis por malhelpi ilian perfortan fortrenadon, sed apenaŭ paŝinte tra la pordo de kelo, li terenfalas trafite per maŝinpistol-kuglo. — Sin apogante al unu de siaj pastroj li ree malsupreniris en la kelon. Liaj unuaj vortoj estis: MI DANKAS AL VI, MIA JESUO, KE MI POVAS SUFERI ĜUSTE JE SANKTA VENDREDO.

La soldatoj lasis la virinojn kaj forkuris. Kiam la episkopo eksciis, ke al neniu okazis iu ofendo li, diris: VALORIS!

La vunditan episkopon oni portis sur brankardo en hospitalon. Survoje du soldatoj scivole rigardis lin, sin klinante super la brankardo. La episkopo levante sian tremantan brakon benis ilin.....

La operacio ne povis halti la proksimiĝantan finon. La fortoj de la korpo iom post iom elĉerpiĝis, nur la animo restis vigla ĝis la lasta minuto. Post ricevo de la Plej Sanktaĵo, liaj lastaj vortoj estis: MI SALUTAS MIAN PASTRARON. ILI RESTU FIDELAJ AL LA EKLEZIO. PREDIKU KURAĜE LA EVANGELION, HELPU REKONSTRUI NIAN MALFELIĈAN PATRUJON, HUNGARUJON, KAJ REGVIDU SUR LA ĜUSTAN VOJON NIAN MALFELIĈAN, ERARIGITAN POPOLON.

DIO, MIA PATRO, MI OFERE PREZENTAS MIAN KORPON KAJ ANIMON, METANTE TIUJN EN VIAN MANON. JESUO, MARIA, JOZEFO, ESTU ĈE MI NUN KAJ EN LA HORO DE MIA MORTO! SANKTEGA KORO DE JESUO, MI FIDAS JE VI! MI OFERE PREZENTAS ĈIUJN MIAJN SUFEROJN PENTOFARE PRO MIAJ PEKOJ, POR MIA PASTRARO, POR MIAJ FIDELULOJ, POR LA GVIDANTOJ DE LA LANDO KAJ POR MIAJ MALAMIKOJ. MI PETAS DION, KE NE ATRIBUU AL ILI JE PEKO, KIUN ILI FARIS KONTRAŬ LA EKLEZIO EN ILIA BLINDA OBSEDO. MI OFERE PREZENTAS MIAJN SUFEROJN POR MIA KARA PATRUJO KAJ POR LA TUTA MONDO! SANKTA STEFANO PETEGU POR LA MALFELIĈA HUNGARARO!

Episkopo Vilhelmo APOR je la unua horo frumatene de Paska Lundo metis sian vivon antaŭ la trönon de la „ŜAFIDO“, kiel belan oferdonacon.....

EL „PANNONIA SACRA“ Esperantigis I. K. K.

Lukto pro Dio

Temas pri katolikaj loĝantoj de urbo *Kazaganda U.S.S.R.* Kazaganda estas urbo de preskaŭ 400.000 loĝantoj. Kozakoj fondis ĝin kaj pro tio la pli aĝaj homoj portas kozakan kostumon. La gejunuloj tamen estas vestitaj laŭ diversaj naciaj kostumoj. La religio plej konfesata estas la mohamedana. Grupo da katolikoj konsistas plej parte el germanaj enmigrintoj. Ne unu katolika preĝejo troviĝas tie. La unika sacerdoto tie estas mortanta kaj ne atingos sian 90an naskiĝtagon, kiu devos okazi en la monato decembro. Tiel oni skribas al mi. Jam antaŭ longe li estas blinda kaj surda. Do li ne povis utili al siaj samkreduloj. Ni preĝu por li! Korespondantino el Riga informis min, ke fine vizitis ŝin iu el ŝiaj konatinoj de Kazaganda kaj plorante kisis la murojn de la katedralo pro ĝojo, ke post tiom da jaroj ŝi retrovis katolikan preĝejon. — Kion vi faras por iomete plenumi la bezonojn de via animo? — mi demandis.

Mi ricevis jenan respondon: — Dimanĉe kaj festtage ni kunvenas en unu el niaj hejmoj kaj matene ni laŭte diras nian komunan preĝon. ... Enpense ni unuiĝas kun la Sankta Ofero de la Meso kaj diras sekvantan preĝon:

„Ni rekomendas nin al Dio dum ĉiuj S. Mesoj tiuĉimomentaj en la tuta mondo. Ni deziras gajni ĉiujn eblajn indulgojn per niaj preĝoj kaj bonaj agoj. Aspergu nin, ho Sinjoro, per Via graco. Purigu nin de peko kaj krimo. Per la grandvalora Sango de Jesuo Kristo gardu nin kontraŭ la infera fajro. La nomo de la Sinjoro estu laŭdata kaj benata ...” k.t.p.

Poste ni preĝas nian rozarion aŭ iujn ajn preĝojn kaj kantas kelkajn himnojn. Dimanĉe posttagmeze ni kantas latinlingve la Vesper-psalmojn. Jen ĉio farebla de ni por la savo de nia animo. Estas hodiaŭ la festo de la ĉefanĝelo S. Miĥaelo. Per naŭtagaj religiaj ekzercoj ni preparis nin al tiu festo. Ĉeesti en la S. Meso ni ne povas, konfesi nin kaj komunii ne estas eble al ni. Spirite ni tion faras. — Plie ŝi petas al mi, se eble havigi al ŝi germanlingve la *Officium Marianum*. Kiom ni devas senti senmerite favoritaj super tiuj mizeruloj!

Ĉu vi preĝas kun mi por ili?

Patro F. J. Preller O.P.

HELPITA DANK' AL ESPERANTO!

La flandra sekcio de la en Nederlando fondita kaj tre konata „Bond Zonder Naam” (t.e.: La Unuiĝo Sen Nomo), tre meritplena movado, jam de longe estis en embaraso pro du kialoj. Unue ĝi volis akiri la kompletan tekston de la parolado de Prezidanto *Lübke*, la 21an de septembro 1960, en *Frankfurto*, okaze de la atribudo de la pacpremio al la angla publicisto *Victor Gollancz*. Due ĝi volis akiri iun ekzempleron de la angla katolika ĵurnalo „*The Tablet*”.

Ĝis antaŭ kelkaj tagoj ĉiuj klopodoj restis vanaj. Fine iu esperantisto, membro de menciita movado, interesiĝis pri la afero, kaj li tutsimple skribis leteron al la delegitoj de *Frankfurto* kaj *Londono*; kelkajn tagojn poste li je ĉies miro povis montri kaj transdoni la kompletan tekston de la parolado de la ŝtata Prezidanto *Lübke*, kaj ne nur la ĵurnalon „*The Tablet*”, sed krome tri aliajn tre interesajn londonajn gazetojn katolikajn.



ESPERANTO VIVAS



POLLANDO. La 28-an de nov. pasinta, je la 19a horo, en la salono 26 de la Katolika Universitato en Lublin havis lokon eksterordinara kunveno de la *Scienca Esperantista Rondo*, kiun partoprenis ankaŭ invititaj gastoj. En la komenco estis laŭlegata telegramo de nia IKUE-ĉefdelegito en Pollando *sac. H. Paruzel*. Sekvis referato interesplena de S-ro *Lic. Kolaczowski*, ligita kun viva pensinterŝanĝo inter la preleginto kaj la ĉeestantaro. Ĉies

atento estis turnita je la IKI-agado kaj je la kampanjo enkonduki Esperanton en almenaŭ 52 polajn lernejojn.

Ni informas niajn EK-legantojn, ke nia revuo jam plurfoje notis sur siaj paĝoj la poresperantan agadon en la Katolika Universitato de Lublin. Hodiaŭ ni precizigu ankoraŭ la ekziston de la *Scienca Esperantista Rondo* en tiu Altlernejo. Nome, la Rondo ekzistas ekde la 4.VI. '60, dokumente aprobita de la Universitata Rektoro *sac. d-ro Mariano RECHOWICZ*.

Por la S.E.R. oni bonvolis destini ejojn por la biblioteko kaj por la kunvenoj. La kuratoro de S.E.R., S-ro *Lic. Kolaczowski*, aranĝis jam plurajn prelegojn kaj t.n. „vesperojn”, interalie honore al la Zamenhofaj datrevenoj. Ekzistas Esperanto-Lektoratoj: komenca, gvidata de *sac. Hilario Hochol* kaj supera, de S-ro *Kolaczowski*.

La Rondon aktivigas elektita estraro, kies prezidanto estas S-ro *Eligio Sitek*. Oni scias diskutigi la kunvenantojn. Laste tuŝitaj estis problemoj gravaj; estis preparataj ĝisfunde jenaj aferoj: Statut-projekto, kontaktoj kun aliaj Esperanto-centroj, ekspozici-aranĝoj, disdono de diplomoj kaj distingoj por la S.E.R.-anoj, propagand-vojaĝoj ktp.

Ni gratulas al la respektinda KUL-Estraro kaj al ĉiuj verdstelanoj en Lublin pri la ĝisnuna prospera agado kaj invitas ĉi-okaze aliajn Katolikajn Universitatojn en la mondo imiti la S.E.R. kaj se eble kontakti kun ties gestudentoj, entuziasme laborantaj por nia bela, venkoira mondlingvo — P.K.U.E.-ano. *

AKLE. Vieno aranĝis siajn tradiciajn advent-mediton 13.XII, advent-Diservon dum kiu predikis kaj celebris *Patro komandoro Georg Plank*, 18.XII; Kristnasko-solenon 27.XII. kaj partoprenis la imponan ĝeneralan *Zamenhofan feston* de la Viena esperantistaro 17.XII. en la nova festsalonego de magistrata domo, Vieno.

La nova *kalendario de la ĉefdiocezo Vieno (Wiener Diözesankalender 1961)* ree enhavas en sia rubriko „Wegweiser” (vojmontrilo) 24-linian mencion pri la katolika Esperanto-movado, AKLE, IKUE, IKI kaj Espero Katolika, fine pri la IEmuzeo kaj pri la tie trovebla katolika Esperanto-literaturo.

ITALUJO. S-ro D-ro advokato *J. S. Boscarino, Ragusa, Sicilio*, fervora propagandisto de Esperanto kaj dum multaj jaroj membro de IKUE, sendis dum la festo okaze de la 15-jara ekzistado de la Itala Esperanto-Federacio, mesaĝon al ĉiuj siciliaj esperantistoj, por inviti ilin aniĝi al menciita Federacio. La mesaĝo estas presita en manskribaj literoj en la formo de telegramo, kun ĉiuj indikoj kiujn telegramo ordinare portas: vere tre originala ideo! Ni esperas ke multaj sicilianoj sekvis tiun alvokon kaj ke ĝenerale ĉiuj samideanoj komprenu, ke ili ne devas resti memstaraj, sed esti membroj de unu aŭ pluraj el la ekzistantaj Esperanto-unuiĝoj, kiuj bezonas la subtenon de ĉiuj, por povi atingi la venkon de Esperanto! *

L'Osservatore Toscano, itala katolika semajna gazeto, mencias en sia numero de 27.11.60, ke *Kardinalo A. Bacci*, fama latinisto, deklaris antaŭ nelonge, ke estus absurde proponi la latinan kiel komunan lingvon por ĉiuj. Laŭ lia Eminenca Moŝto estas verŝajne oportune, lasi la vojon libera al Esperanto kiel ĝenerala lingvo, dum la latina povus esti akceptata por la internaciaj kulturaj kongresoj, por la literaturistoj kaj humanistoj ĝenerale. Esperanto estas konsiderata la ununura lingvo, kiu havis konsiderindan sukceson sur la tereno al kiu ĝi estas destinata. Kompreneble ni samopinias kun la Kardinalo, sed volonte vidus, ke niaj sacerdotoj-esperantistoj klopodus konvinki lin, ke Esperanto taŭgas por ĉiuj sciencaj kongresoj ktp. pli ol la latina lingvo! *

EL LA VASKA FOLKLORO

En la artikolo „*La pola jaro*” (Vd.E.K.-1959-n-ro 493) mi legis i.a.:

— „Laŭ malnovaj polaj proverboj la abelo ne estas sole insekto. Ĝi posedas senmortan animon egala al tiu de homo. Malpermesita estas abelmortigo. En la komenca tempo de la kristaneco ekzistas tradicio, ke post la morto de hejmestro aŭ dommastrino oni iris al la abeloj por ilin informi pri la trista sorto.”

— Laŭ pola legendo la Dipatrino „helpas al la kampulo kiam ŝi forkuris Egipton, ĉar forkurante ŝi kreskigis mirakle tiel rapide la jetatan grajnon, ke ŝi povis kaŝi sin kaj la karajn siajn en la alta pajlaro, inter la spikoj, kiam la senditoj de Herodo ŝin postsekvis. Kiam la kruelaj soldatoj demandis la kampulon: „ĉu vi eble vidis Virinon kun Infano kaj maljunulon?” la kampulo povis respondi ne mensogante: „jes mi vidis.” Sed kiam ili insistis pri la tempo li asertis: „kiam mi semis tiun tritikon”, kaj tiamaniere la kampulo returnigis la serĉantojn kaj savis la S-tan Familion.”

— Vaskaj kamparanoj sentas por siaj abelaroj miksaĵon de amo kaj de kvazaŭ religia respekto, kiun ili ne sentas por ia ajn supera besto. Kiam pro ia kaŭzo, la abelaro ŝanĝiĝas de propraĵo, la nova posedanto sin prezentas antaŭ la abelejo kaj kun plej granda respekto alparolas ĝiajn laboremajn loĝantojn: „abeloj, mi sciigas Vin, ke Via mastro X mortis (aŭ cedis Vin al mi). Via nova mastro nomiĝas Y Z (nomo kaj antaŭnomo)”. Oni kredas ke, se oni ne agas tiel la abeloj ofendiĝis kaj ĉesos labori, aŭ pli malmulte laboros ol antaŭe. Tio, kio tamen preskaŭ ĉiam okazas, ĉar la abelbredado, kvankam simpla afero, havas sian sekreton, kiun la nova mastro nur iom post iom malkovros.

— Ankaŭ la fabelon pri la persekutantoj de la infano Jesuo kaj la tritikkampoj mi aŭdis rakonti, kiam mi estis knabino, al maljuna almozulino.

Hispanujo suferis multajn invadojn de diversaj popoloj. Tamen neniam de slava gento. Nur dum la Napoleonaj militiroj estis kelkaj (malmultaj) polaj soldatoj en Vaska lando.

Ekzistas ankaŭ multaj teorioj pri la deveno de la Vaska popolo, kiu restas ankoraŭ ne solvita mistero. Oni intencas trovi parencajn trajtojn en Kaŭkazaj gentoj, en Turkestanaj, en Bereberaj, en Praketaj ...sed neniam mi aŭdis pri slava origino. Kial ĉe du popoloj tiel malproksimaj, neniam reciproke sin trovintaj en la vojoj de la Historo, vivas du tute egalaj legendoj? Mi lasas la respondon al folkloristoj. Mi, leginte la du kazojn en „*Espero Katolika*”, pensas ke estas mia devo konstati la fakton.

Amalia Núñez Dubús.

Letero el Aŭstrujo.



Benediktana abatejo en Melk.

kan ekspozicion dum la 167 tagoj en kiuj ĝi estis aranĝita, inter ili multaj el eksterlando, eminentuloj, sed same multegaj modestaj civitanoj, precipe granda nombro da gelernantoj kun siaj instruistoj, societoj, grupoj de popolaltlernejoj k.a.


La aŭstria komponisto *Gustav Mahler*, kies 100an naskiĝ-tagon oni en la medio de muziko nunjare festas — Aŭstrujo eldonis apartan memor-poŝtmarkon — estis, laŭ konstatoj de la plej nova esploro, akceptata en la katolika eklezion 37jara, je la 23a de februaro 1897 en Hamburgo, kie li agis kiel unua orkestrestro. Poste li estis vokita kiel direktoro al la kortega operejo en Vieno. La matrika listo de la malgranda preĝejo de Sta. Mikaelo atestas lian baptiĝon.

La konata Viena poeto *Werner Bergengruen* konvertiĝis en la jaro 1936 al la katolikismo. De 1958 li vivas en Baden-Baden (Germanujo). Lia verkado ampleksas romanojn, novelojn, sed ankaŭ lirikan poezion. Li montras la homon laŭ kristana vido kvankam kiel pekfalinton, sed tamen destinitan por eterna beateco. Liaj „herooj” ne estas grandaj, sed ĉiam endanĝerigitaj homoj, kelkfoje ankaŭ malvenkintaj.

Vere signifa *Barok-ekspozicio* okazis de majo ĝis oktobro 1960 en la fama benediktana abatejo *Melk apud Danubo*, fondita de la Babenberga limgrafo Leopoldo IIIa, la sanktulo, en la jaro 1107.

Estis ekspoziciitaj precipe valoraj, signaĵoj kaj verkoj en kundependo kun la novkonstruo de la impona monaĥejo dum la 18a jarcento (de 1702 - 1736) kaj ĝia konstruinto *Jakobo Prandtauer*, majstro de la konstruado baroka, naskiĝinta en la jaro 1660 en la tirola vilaĝeto *Stanz* super la nuna urbo *Landeck*, veninta poste al *St. Pölten* kaj tie fervorege aganta. La ekspozicio estis samtempe honoro je ties 300a naskiĝtago.

Pli ol 380.000 personoj vizitis la uni-



Naskiĝdomo de Jakobo Prandtauer en Stanz, Tirolo.

(I.a. laŭ „*Kleines Volksblatt*”
W. Mudrak, Vieno.)

INTERNACIA ESPERANTO MUZEO EN WIEN (IEMW)

Hofburg, Wien I, Aŭstrujo.

JEN VIA MUZEO, al kiu kontribui ĉiu vera esperantisto *kordeziras!*

Ekzistas tri vojoj: 1. fariĝi membro, 2. sendi materialon, 3. kunigi 1 kaj 2.

MEMBROKATEGORIOJ:

a) *MECENO*: kotizo unufoje almenaŭ 50 resp. kup. (rk), estos eternigata sur speciala tabulo en la Panteono, ricevos la *INFORMILON* de IEMW dum 3 jaroj sen kroma pago.

b) *DUMVIVA MEMBRO*: unufoje almenaŭ 25 rk, membrokarto, sen kroma pago *INFORMILO* dum 2 jaroj, eternigata de Panteono;

c) *DUMVIVA MEMBRO kun dumviva ricevo de la Informilo* (kreita pro diversflanka iniciato), laŭ la aĝo.

d) *SUBTENANTA* kun jara pago de 8 rk, membrokarto, Informilo, 4-foje dum la jaro. La abonjaro komenciĝas aŭ 1.I. aŭ 1. VII. Por ĉiuj membroj rabato ĉe mendo de la Katalogoj kaj aliaj broŝuroj de IEMW.

NI KOLEKTAS ĉion pri aŭ en Esperanto, sed ankaŭ pri sistemoj kaj problemoj de Intern Lingvo kaj petas alsendon de libroj (ĉiuj eldonoj), bruŝuroj, gazetoj (ankaŭ unuopaj numeroj pro kompletigo), manuskriptoj (eldoneblo restas al la donacintoj), ŝlosiloj (ĉiuj eldonoj), gvidiloj, prospektoj, regularoj, statutoj, komercaj varbiloj, afiŝoj ĉiuspecaj, la tuta materialo pri ĉiuj ĝisnunaj kongresoj de UEA, SAT, IKUE, IFEF ktp. (kongreslibroj, membrokarto, menuoj, gazetoj, teatroprogramoj kaj la samaj aferoj de la Naciaj Kongresoj de ĉiuj landoj, kovertoj kaj poŝtkarto kun Esperanto-teksto, vidajkartoj, fotoj de niaj pioniroj kaj meritplenaj gesamideanoj kaj leteroj de ili, fotoj pri Zamenhof- aŭ Esperanto-placoj, stratoj, ŝoseoj, aleoj ktp. kun indiko pri la inaŭgurdato, teatraĵoj ne presitaj kaj presitaj, glumarkoj ktp.

Nenion forĵetu, sed sendu al ni!

Se vi deziras sendi al ni pli grandan kvanton, skribu antaŭe al ni kaj preskaŭ ĉiam ni povos doni al vi la vojon pri senpaga sendo de via lando al la nia!

La ĉefa afero estas la ekspluato pri la ekzisto de la IEMW en la propagando por Esperanto. Estas superflue je tiu okazo nomi nomon.

La venko de Esperanto estas nia celo kaj la ekzisto de IEMW kiel *Corpus separatum* en la kadro de la mondfama Aŭstria Nacia Biblioteko kaj la fakto, ke la aŭstria Ŝtato donas la monrimedojn por bona funkciado, konvinkos!

Kore invitas la fondinto Hugo Steiner.



KURSO PRI INTERNACIAJ INSTITUCIOJ

Somerferia kurso pri internaciaj institucioj okazis en la Universitato de Ĝenevo de la 18-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto. La partoprenantoj aŭskultis prelegojn kaj vizitis plurajn organizaĵojn en Ĝenevo. Tuja kaj samtempa interpretado en la lingvojn anglan, francan, germanan, hispanan kaj italan ebligis al la studentoj sekvi la kurson.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo)



HARROGATE: 5-12viii-1961
46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Harrogate - Britujo

5-12 aŭgusto 1961

ALTA PROTEKTANTO: LORDO BOYD-ORR,
M.A., M.Sc., F.R.S. NOBEL-PACPREMITO

Korespondadreso : 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.
Telefono : Harrogate 4685
Telegrafo : Esperanto Harrogate.
Banko : Midland Bank Ltd. Harrogate

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario „Oriento-Okcidento (Londono 2-4 Aŭgusto 1961): S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono N. 5

17-a T.E.J.O.-Kongreso (12 - 19 Aŭgusto 1961): S-ro T. G. Page, 90 Ross Street, Cambridge.

N-ro 3/4

OFICIALA KOMUNIKO

decembro 1960

PROSPEKTO PRI HARROGATE: La Urbo Harrogate decidis eldoni en Esperanto plurkoloran turisman prospekton. Interesitoj povas mendi la prospekton ĉe la Kongresa Oficejo, aldonante unu respondkuponon por la afrankkostoj.

LOGADO EN HARROGATE : Jen provizoraj prezoj por loĝado en Harrogate:

<i>Hoteloj</i>	<i>tranokto kun matenmanĝo</i>	<i>kompleta pensio</i>
1-a kategorio	32/6 ĝis 42/6	47/6 ĝis 60/-
2-a kategorio	20/6 ĝis 27/6	25/6 ĝis 45/6
aliaj „	14/-	21/-
<i>Pensioj</i>	ek de 12/6	ek de 17/6

Pliaj detaloj kaj kondiĉoj por komuna loĝejo aperos en la Dua Komunikilo.

BRITA VESPERO: okazas kun enkonduka prezento pri la karakterizoj de la Kongreslando kaj respondado al liberaj demandoj.

CSEH-SEMINARIO: okazos en Harrogate dum la Kongresa semajno. Ĝi daŭros 15 horojn. Kotizo: 32 steloj, pageblaj ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Hago, aŭ (por britoj) ĉe S-ro H. Holmes, 38 Fillebrook Road, London E. 11.

SPECIALA NUMERO DE „BRITISH ESPERANTIST“:

pri la Universala Kongreso, Arta Festivalo kaj Kongreslokoj estas ricevebla de la Kongresa Oficejo kontraŭ sendo de du intern. respondkuponoj.

PARKEJOJ: La esperantistaj aŭtomobilistoj povos senpage utiliĝi la parkejojn en Harrogate.

OFICIALA AKCEPTO : La Urbo Harrogate decidis akcepti kaj regali la tutan kongresanaron dum vespera muzika programo.

SPECIALAJ FAVOROJ : La Urbo Harrogate decidis, ke la kongresanoj ĝuos jenajn avantaĝojn dum sia restado en Harrogate:

1. Senpagan eniradon en la Sunan Pavilonon kaj Sunan Kolonaron.
2. Senpagan eniradon en la Lounge Hall,
3. Senpagan tenisludadon en la Valaj Ĝardenoj.
4. Senpagan uzadon de la miniatura Golfejo kaj aliaj ludejoj.
5. Senpagan eniradon en la Naĝbasenon.

FAKAJ KUNVENOJ : Anoncis fakkunvenon i.a.:

— Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: publika pedagogia diskuto „Edukado por internacia kompreno en lernejoj”. (Adreso: 183, Woodlands Park Road, Birmingham 30, Britujo)

— Veterana Esperantista Klubo: „Memorigo pri fruaj agadoj” (Adreso: S-ro Lewins, 33 Kingscroft Ave., Dunstable 674, Britujo)

— Kristana Esperantista Ligo Internacia: „Aktualaj problemoj en la mondo”. (Adreso: Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando)

ARTA PROGRAMO POR AMATOROJ : En la kadro de la Arta Festivalo okazos Arta Programo rezervita al esperantistaj amatoraj artistoj. Rajtos partopreni nur altnivelaj amatoroj (debutantoj ne estos akceptataj), kiuj kutimas prezenti programon. La amatora aranĝo konsistas el skeĉoj, unuaktaj teatraĵoj (maksimuma ludodaŭro: 15 minutojn), kantoj, ĥoroj, instrumenta ludado, k.s. (maksimuma ludodaŭro: 6 minutojn). Proponoj de individuaj amatoraj artistoj aŭ grupoj devos atingi la Kongresan Oficejon en Harrogate antaŭ la 28-a de februaro 1961. Ĉiu propono devos esti akompanata de rekomendo de la landa Esperanto-Asocio aŭ de loka arta instanco kaj kompletigita per ĉiu necesa referenco. Neniu kandidato estos *allasata al la programo*, kiu ne respektos la fiksitajn limojn kaj la aliajn kondiĉojn.

STATISTIKO (ĝis fino de novembro): 318 el 28 landoj (Pasintjare 304 el 28 landoj).



31. *Faru mem libreton!* Multvalora tiu Indekso en la lasta numero! Se vi la tie donitajn faktojn entute aŭ resume transskribas — plej bone laŭ materialo kaj/aŭ alfabeto en ne-ligitaj kajeroj — vi certe akiros bone aranĝitan tuton kiun vi povos uzi ĉe via propagando. Averteto: ne forgesu ĉe ĉiu notajo indiki jarkolekton, numeron, paĝon k.t.p. por tuj povi trovi iun artikolon. Vi povos ankaŭ aranĝi slipan sistem(et)on laŭ materialo kaj/aŭ alfabeto. Tiam sufiĉos mallonga referenco al *Espero Katolika* (se vi tamen bone konservas la (tiel valorajn) kajerojn!)

32. *Kelkaj postmeditadoj.* A. HOREKO. *Pastrado kaj turismo.*

En la kadro de la Eŭkaristia Kongreso en Munkeno la 6an de aŭgusto '60 ankaŭ okazis la kongreso por la HOREKO (Horeka = Hotelo, Restaŭracio, Kafejo) dediĉita al: Pastrado kaj turismo. Durante la pontifika Meso en la preĝejo de la S. Triunuo *Msro von Streng*, episkopo de Bazelo kaj Lugano, faris la festpredikadon (sendube: germanlingve), kiun la multnombraj hotelistoj tre atente aŭskultis (ĉu ankaŭ komprenis?). — *Resp. p. Höppner, inter-*

nacia sekretario de la Horeko-pastroj, eldiris en sia enkonduka parolado al la kongreso, kuniĝante al tiu prediko, ke sekve de la kreskanta turismo tiu branĉo de la Horeko-pastrado meritas pli grandan atenton ol antaŭe kaj hodiaŭ ankaŭ ricevas (ankaŭ rilate la lingvojn?).

Kardinalo Bea en brila referato priskribis el la Biblio la orientan gastamon kiel la bazan sintenadon de la homo kaj honoran devon kristanan.

Mstro Gargitter el Briksen, Tirolo, grava turisma loko, pritraktis turismon kaj pastradon. La pastrado en rilato al la turista problemo kaj la Horeko-pastrado devas esti enkadrita en la tuta pastrado. En la pastraj konferencoj tiu problemo devas esti preparolata ne nur nacie sed ankaŭ internacie, ĉar estas internacia problemo. En la ĉefsezonoj li opiniis prava la enigon de specialaj pastroj en la turismaj regionoj. La organizoj de katolikaj labordonantoj kaj laboristoj en la Horeko laŭ lia opinio estas tre gravaj por la konservado kaj la plivastigo de la kristana spirito en la Horeko-metio. Ankaŭ ĉi tie internaciaj kunlaborado kaj interŝanĝo estas valoraj. Bone redaktita internacia fakrevuo en kristana spirito estas de li dezirata kaj rekomandata. —

En sia dankparolado *Patro Höppner* preparolis la eblecon transformi la monatan gazeton „Einkehr“, nun aparantan en Aŭstrujo, Germanujo kaj Svislando en internacian katolikan fakrevuon.

Jen kion mi elĉerpis el *Leidse Courant* 20.8.1960; kion mi metis inter krampoj estas de mi mem; ĉu ĉio tio apartenas al nia rubriko? Mi opinias ke jes; sed iomete alimaniere ol ordinare; la priskribita tre grava okazaĵo devas instigi la esperantistaron turni nian muelilon, kiam oni ekzemple survojaĝe loĝas en hotelo aŭ ion konsumas en restaŭracio aŭ kafejo; ĉiam kaj ĉie ekdemandi ion esperantlingve; kiam sekvas interparolado — ne esperantlingve — instigi la fukciulojn eklerni la lingvon; por tio vi transdonu iun incian libreton kun la adresoj de nia movado en ilia lando; eble vi povos admoni ilin uzi sian influon por fari esperantan fakkurson en siaj organizoj k. t. p. Sed ankaŭ: oni ne hontu alparoli katolikan pastron en Esperanto; mi mem scias ke alilandaj pastroj atestas, ke ili (preskaŭ) neniam renkontis esperantiston; nature, se ni mem nur klopodas balbutaĉi iun fremdan lingvon!

Kaj ankaŭ: ĉu ni esperantistaj pastroj ne kuraĝos, kiam la okazo sin prezentas, ĝuste pro tiuj kaj tiaj aferoj en la turisma sfero, peti la altrangajn ekleziulojn, ke ili enkonduku Esperanton kiel fakon en la pastrajn seminariojn k.t.p.?

C. A. Ouwendijk, paroĥestro, Rijpwetering Ned.



H. A. de Hoog: La ata-ita problemo I-VI
en: *Dia Regno* 1960, 468-469; 477, 479;
485-486; 494-495; 507-508; 522-523

Vilho Setälä: Pri ata kaj ita
en: *Oomoto* 1960, 53-55

Teo Jung: La kompleksaj verboformoj
en: *Heroldo de Esp.* 1960, nroj 8 - 11
(1304-1307)



HASTINGS AND ST. LEONARDS nomiĝas ilustrita faldfolio por propagandi la belecojn de tiuj anglaj banlokoj. Al la anglalingva propagandilo estas aldonata aparta folio kun teksto en Esperanto, kun invito viziti la lokan Esperanto-Grupon. Havebla ĉe: *Information Bureau (E), Verulam Place, Hastings, Sussex, Anglujo*. Skribu p.k. en Esperanto! *

MALMÖ, SVEDUJO. Nova, bela kaj multkolora faldbroŝuro pri *Malmö*, la konata centro de la sveda Esperanto-movado. Jam antaŭe la urbo eldonis tian broŝuron; la dua eldono enhavas tute novajn, plurkolorajn bildojn, grandan urbokarton kaj ekskursplanon

por Skanio, la plej suda sveda provinco. Ricevebla kontraŭ unu respondkupono ĉe: *Malmö Turisttrafikförening, Malmö, Svedujo*. Skribu en Esperanto kaj nepre mendu la *Esperanto-eldonon*. *

GREZINJONO INVITAS VIN! Verkis *André Ribot*. 16 p. ilustrita, kun plurkolora kovrilo, 21 x 13.5 cm. Prezo NF 1,10 ĉe Franca Esperanto-Eldonejo, 11, rue Paul Vergnes, *Marmande, Francujo*. — La libreto estas dulingva: paraj paĝoj en Esperanto, neparaj en franca lingvo. Ĝi priskribas la alvenon kaj restadon de 3 gestudentoj en la fama Esperanto-kastelo, kun la tagordo, kunvenoj, kursoj kaj ekskursoj kaj fermas per kelkaj praktikaj informoj. *

LA ESEKONKURSO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Ek de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro 1961, la Skolta Esperantista Ligo okazigos sian unuan esekonkurson kun tri monpremioj: Usona \$ 25,—, \$ 15,—, kaj \$ 10,—. Ni invitas vin aliĝi al la Skolta Esperantista Ligo po tri (3) ŝilingoj jare kaj partopreni en nia esekonkurso kies ĝeneralaj temoj sugestitaj sekvas: aŭ Kiel la skoltismo maturigas nian junularon, aŭ Skoltoj kiel mond-civitanoj, aŭ Kiel sukcesigi la skoltan trupon.

Konkurskondiĉoj: La konkursanto devas esti dumtempa membro de la Skolta Esperantista Ligo. Speciala slipo atingebla ĉe la Kasisto devas esti alfiksita al la manuskripto kaj sendata al la adreso surprisigita. (La Kasisto akceptos neniun respondecon por manuskriptoj.)

Ĉiu manuskripto devas esti originala verkaĵo simile aŭ sekvanta la ĝeneralajn temojn supremenciitajn. La manuskripto aŭ devas esti tajpita kaj duoble spacita aŭ povas esti klare manskribita enhavante minimume 250 vortojn.

Ĉiu manuskripto sendita iĝos la posedaĵo de la Skolta Esperantista Ligo.

Kontaktu David H. Withey, Kasiston de S.E.L., 21 Brookfield Avenue, Waterloo, LIVERPOOL 22, Anglujo.

L. J. Van Gulck

Prezidanto Skolta Esperantista Ligo

SOLVO DE LA PROBLEMO sur p. 218.

dormi — inter — buklo — ermito — nutri — identa — torako — ankro — negro — kapro — rikano — invado — skuno — talaro — nobela — adori — stilo — korpo — ferio — etudo — stebo — tinko — ostro — neĝi.

Dibenitan Kristnaskfeston!



Anoncetoj

S-ro Folkert Bijlard, Gooiberg 18, BUS-SUM, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. *

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun seriozaj filatelistoj: *sacerdoto Jozefo Zesas, ZABROWO k/ILAWY, woj. Olsztynskie, Pollando.* *

Nova metodo por varbado! Novaj, nerefuteblaj argumentoj. La varbita poste neniam seniluziiĝos. Varbilo kun instrukcioj: 5 intern. resp. kup. Adreso: *Esperanto-propagando, poŝtfako 212, Lund, Svedujo.* *

Esperanto-filatelistoj! Kiu povas oferti al mi ne-uzitajn Esperanto-poŝtmarkojn? Mi serĉas por statistikaj kaj propagandaj celoj kelkajn seriojn jugoslavajn, hungarajn (nur tranĉitajn!) brazilajn (eldonitajn en 1935, 1936, 1945) kaj rusajn (la tranĉitajn markojn — telegrafejo en Moskvo — kaj la markon — Popov — kun inversa surprisigo de „8 kop.“). Mi egaligas tute laŭdezire ĉu esperantaje, ĉu egalvalore, ĉu per pago de IKUE- aŭ UEA-jarkotizo, ĉu per abonpago de kiu ajn Esperanto-gazeto, ktp. — *Josef Merz, Hauptstr. 14, Sackenbach-Lohr a. Main, Germana Federacia Respubliko.* *

Ĉu vi ĉi-jare iros al Fatimo? En la „Casa Beato Nuno“, kie loĝas nia samideano Patro *Gabrielo Pausback O. Carm.* — ne forgesu viziti lin! — vi povas akiri unu aŭ dupersonan ĉambron kun privata bano por 110 resp. 165 eskudoj; kun privata duŝo 60 resp. 90 esk. por nokto, inkl. matenmanĝo; liton en dormejo por 30 esk. nokte. Tag- aŭ vespermanĝoj po 40 eks. (Eskudo = duona stelo). Petu informojn aŭ mendu ĉambrojn en *Esperanto ĉe Casa Beato Nuno, Fatima, Portugalujo.* *

La Internacia Katolika Inĝormejo donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan gazeton „Vojo, Vero, Vivo“. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la sekretario de I.K.I. *Gasthuisstr. 68, TILBURG, poŝtkonto 268507.* Por eksterlandanoj la adreso estas: *Sac. H. Roosen, redaktoro VVV, Huize „St. Gerlach“, HEER (L), Nederlando, poŝtkonto 134120.* Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj reprezentantoj de IKI kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn. *

Instruisto deziras korespondi kun ĉiuj landanoj pri filozofiaj kaj religiaj temoj. *Ludoviko Tovini, Piazza San Dominico 1, Pistoia, Italujo.* *

Mi deziras korespondi kun katolikoj en Norvegujo, Svedujo kaj aliaj landaj de Eŭropo, Sud-Ameriko kaj Sud-Orienta Azio, preĉipe kun Ĉinujo kaj Japanujo. S-ro Stanley Kelly, 9, Foden St. *West Brunswick N. 12, Victoria, Aŭstralio.* *

TARIFO POR ANONCOJ

Anoncetoj en la koncerna rubriko: senpage kontraŭ ensendo de la koncerna kupono el la valida kuponaro, kiun ĉiuj membroj ricevas post pago de la kotizo. *Reklamoj sur la kovrilo de ESPERO KATOLIKA:*

tuta paĝo 50 gld.; duona paĝo 25 gld., kvarona paĝo 12,50 gld.

Reklamoj en la JARLIBRO:

tuta paĝo 40 gld.; duona paĝo 20 gld.; kvarona paĝo 10 gld. (1 gld. = 4 steloj). *Eldonkvanto:* minimume 1700 ekz., kiuj estas disvastigataj en 40 landoj.

NI GRATULAS

Resp. Frato Villanova Gsellman, C. op., Vieno, Aŭstrujo, de la kongregacio de Kalasancanoj por la kristanaj laboristoj, festis sian 50-jaran ordenan jubileon. La jubileanta Frato estas esperantisto ek de 1920. Ni deziras al li ankoraŭ multajn bonajn jarojn! Inter krampoj ni menciuj, ke la fondinto de tiu Kongregacio, *Patro Generalo Anton Maria Schwartz*, kiu mortis en 1929 en la aĝo de 77 jaroj, estis granda amiko kaj akcelanto de Esperanto; la oficiala organo „*Kalasantiner Blätter*” jam ofte raportis pri, por kaj per Esperanto. *

Nia fervora reprezentanto en Jugoslavio, *Resp. Patro Lovro Kiš o.ŝ.m. M. Tita 7, Karlovac*, esperas festi la 20-an de marto venonta la 40-an datrevenon de sia sacerdotiĝo. Plej korajn gratulojn kaj bondeziroj por multaj jaroj en bona sano kaj de Dio benata apostolato. *

La konata fervora propagandisto de Esperanto, dumviva membro de IKUE No. 1, *Resp. Frato René-Jean Marmou*, rememoros la 2-an de aprilo 1961 la 10-an datrevenon de sia religiiga profesio en la Kongregacio de la Fratoj Misiistoj de la Kamparanoj. Ni kore gratulas kaj esperas, ke nia samideano ankoraŭ dum multaj jardekoj povos plenumi sian belan taskon en la vinberejo de la Sinjoro. (Adreso: *Prieuré Saint-Martin, La-Houssaye-en-Brie* (Seine-et-Marne - 40 km. oriente de Parizo), *Francujo*. *)

La 27-an de decembro pasinta geedziĝis en la paroĥa preĝejo de Sankta Marteno, en *Meise, Belgujo*, nia membro Nico van Herck kaj f-ino Rosette Huysmans. Ni kore gratulas la junan paron kaj deziras al ili plej feliĉan familian vivon. Ambaŭ estas fervoraj funkciuloj en nia movado: la edzo estas la reprezentanto de la junularunuiĝo TEJO por Belgujo, kaj la edzino UEA-perantino por Belgujo kaj kasistino de la Reĝa Belga Ligo Esperantista.

URĜA ALVOKO

En 1961 okazos jenaj kunvenoj internaciaj:

Februaro: Monte Karlo (Monako): Internacia Katolika Filmofico (angle: Int. Catholic Film Office).

Monte Karlo (Monako): Internacia Katolika Asocio por Radio kaj Televido (angle: Int. Catholic Association for Radio and Television).


Kiuj gesamideanoj volas propagandi tie la uzadon de Esperanto, pere de diverslingvaj flugfolioj — senpage haveblaj! — kiujn ni tiucele presigis? Bonvolu skribi al: s-ro Rik de Roover, Luchtvaartstrato 28, Borgerhout-Antverpeno, Belgujo. Ne forgesu mencii la deziritajn lingvojn (francan, anglan, germanan, hispanan, italan) kaj la kvanton de ĉiu lingvo. — Antaŭdankon!

Kial ni devas havi sufiĉe da memorkapablo por reteni eĉ la plej etajn detalojn de niaj travivaĵoj, sed nesufiĉe por rememori, kiom da fojoj ni jam rakontis ilin al la sama persono?
La Rochefoucauld.

Ĉiun vesperon vi sentos vin feliĉa, se vi nur utile uzis la tagon.

Tomo de Kempo.

Ĵetita ŝtono, paŝita sago, parolita vorto kaj la hieraŭa tago ne estas revokeblaj.
Ovidius.



Horizontale:

- A. kolere kaj brue interdisputi; seki-
gitaj, preparitaj folioj de vegetaĵo,
uzataj por fumado (r).
- B. verkinto de libro (r); kredema kaj
malkaŝema kiel infano.
- C. plej malalta klaso el popolo; ter-
kultura ilo (r).
- D. sovaĝa porko; arkajo sur kolonoj.
- E. grande, laŭ vertikala direkto; pre-
pozicio.
- F. neĝamasego, rulfalanta de monto
(r); plej alta monto en Grekujo,
en la greka mitologio loĝejo de
la dioj (r).
- G. loĝanto de lando en la meza ori-
ento; saluto.
- H. koloro; mezuro de longeco (r).
- I. profite uzebla (adverbo); subteni
pezan objekton (r).
- J. besto(r); birdo; fruktodona tero
en dezerto (r).

K. produktaĵo de birdo (r).

L. muzikinstrumento (r); forta veneno (r).

M. larvo de papilio; ĉefo de universitato;

N. preciza loko, kie iu loĝas (r); malsekigi, surverŝante aŭ trafluigante (r).

O. bakterio, kaŭzanta infektajn malsanojn (r); difinita prezaro pri komercaĵoj,
servoj, laboroj.

P. konjunkcio; tre konata (r); prepozicio.

Vertikale :

I. povanta fari ion; tabelo, anoncanta la detalojn de festo, koncerto, k.t.p.

II. rabobesto (r); alta vegetaĵo kun branĉoj kaj folioj (r); aeroplano (r).

III. tre facile vaporiĝanta fluaĵo (r); valoro de papermono al la ora aŭ arĝenta
metalunuo (r); loĝanto de lando en la okcidenta parto de Azio (r).

IV. vestaĵo; monaĥejestro (r); maldika folio, kiun oni uzas por skribi, presi aŭ
enpaki.

V. peceto; sennoma (r); vaporgutoj, kiuj dum nokto fluidiĝas sur la vegetaĵojn.

VI. marherbo (r); signo ĉe komenco de notliniaro por montri la nomon de ĉiu
noto kaj ĝian altecon (r).

VII. ne havanta propran movon, pasiva. (r); gaso, kiun mi enspiras kaj bezonas
por vivi (r); birdo el la genro de papagoj (r).

VIII. la ŝipo, konstruita de Noa; nekurba.

IX. karakterizanta tipon; lumigilo; iu el la malmolaj maldikaj platoj, kiuj kovras
la korpon de multaj fiŝoj kaj rampuloj (r).

X. fortege dezirante ion (r); imago; esti transportata de unu loko al alia per
speciala ilo (r).

XI. kunveno, en kiu oni dancas; altforma kapvesto de episkopoj; havi kiel no-
mon (r).



FILATELIO

VATIKANO: Serio (4 p.m.) okaze de la 500-jara datreveno de l' morto de Sta. Antonino, episkopo de Florenco:

15 L. blua kaj 60 L. bruna: busto de la sanktulo;

25 L. smeraldverda kaj 110 L. vinruĝa: Sta. Antonino sur la katedro. Gravuraĵo de M. Canfarini laŭ skizo de Grassellina.

Antonino naskiĝis en 1389. Je la aĝo de 16 jaroj li fariĝis Dominikano. Li fervore batalis kontraŭ la nenionfarado kaj liaj predikoj trovis grandan interesiĝon. Kromnomo: Antonino la Konsilanto.

Festotago la 10-an de majo.

6 p.m. „por la rifuĝintoj“:

5 L. malhele verda, 50 L. siringviola (la Sta. Familio rifuĝas al Egiptujo — laŭ pentraĵo de Angelico);

10 L. brunolivkolora, 100 L. blua (Sta. Petro disdonas almozojn al la malriĉuloj de Romo — laŭ pentraĵo de Masaccio);

25 L. karmina, 300 L. blua (Nia Sinjorino de Mizerikordo laŭ pentraĵo de Petro della Francesca).

HISPANUJO: Okaze de la Internacia Filatela Kongreso aperis serio de 6 p.m.:

70 c. siringviolbruna kaj verda, 1 p. siringviola kaj ruĝa, 5 p. bruna kaj okrokolora. La bildo de ĉi tiuj tri markoj estas reprodukto de la krucifikso kiu estis kunportata en la batalo de Lepanto. La tri aliaj valoroj: 80 c. verda kaj verdnigra, 2 p. 50 violkolora kaj blugriza, 10 p. grizbruna kaj okrokolora, montras la preĝejon de la Sta. Familio en Barcelona.

SVISUJO: Tiu ĉi lando eldonis serion de 18 afrankmarkoj por anstataŭi la ĝis tiam uzatajn p. m. El la nova serio ni mencias:

25 r. verda; katedralo de Lausanne el la 12-a jarcento. La solena konsekrado okazis en 1275. En 1536 ĝi fariĝis la ĉefpreĝejo de la Reformacio;

30 r. ruĝa: Katedralo de Zurich, konstruita en la 12-a kaj 13-a jarcentoj. Tie ĉi Zwingli laboris en 1519. 40 r. violblua: Katedralo de Sta. Petro en Genève el la 13-a jarcento;

50 r. blua, Pordego de Sta. Paŭlo en Basel;

70 r. oranĝkolora: Preĝejo de Staj Petro kaj Stefano en Bellinzona, barokstila, el la 15-a jarcento;

80 r. brunviolblua, barokstila katedralo de St. Gallen (1761-1769);

2 fr. blua: Preĝejo de Einsiedeln el la mezepoko. Skizoj de Weiskönig kaj Hartmann; gravuraĵoj de Heussen kaj Yersin.

IRLANDO: ankaŭ aperigis 2 p.m. „por la Rifuĝintoj“ kiuj prezentas la Stan. Familion kiu rifuĝas al Egiptujo:

3 p. hele violkolora kaj 1/3 bruna. Belega bildo laŭ skizo de Karel Uhlemann.

J. S. Jansen

XII. speciala, neordinara; movi sin de iu loko al alia (r); interjekcio, esprimanta malestimon kaj abomenon.

XIII. birdo (r); grandega manĝebla nukso, kies interno entenas specon de lakto(r).

Li de Jong-Roobeek.



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,09 - 25,16 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11955 - 11925 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 1205 kc/s).

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA; merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

Al ĉiuj niaj aŭskultantoj: FELIĈAN KRISTNASKON KAJ

PROSPERAN NOVJARON!

J A N U A R O 1 9 6 1

3: Tra la literaturo; 4: Kuriero de Esperanto; 6: La universala blindultago; 10: Italaj komponistoj: G. B. Pergolesi; 11: Kuriero de Esperanto; 13: Leterkesto kaj bibliografio; 17: Italaj kanzonoj en Esperanto; 18: Kuriero de Esperanto; 20: Romaj bazilikoj: S. Agnesa ekster la Muroj; 24: Novaĵoj el Italujo; 25: Kuriero de Esperanto; 27: La itala Releviĝo kaj Giuseppe Verdi; 31: Filatelo kaj Esperanto.

MAGNETOFONA SONBENDO

Kun la celo instigi la esperantistojn en la tuta mondo aliĝi al la Universala Kongreso kaj por alproksimigi la kongresemulojn al la Kongreslando kaj al la kongrespreparoj, la Loka Kongresa Komitato de Harrogate preparis magnetofonan programon je dispono de ĉiuj Esperanto-Societoj.

La sonbendo daŭras entute 35 minutojn kaj enhavas paroladon de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A., Prof. I. Lapenna, intervjuojn kun la Prezidanto de L.K.K., S-ro R. W. Hamilton, kaj kun Ges-roj Fighiera, alvokon de la infano Anlucia Delgado kaj mesaĝon de la Urbestro de Harrogate.

En la muzika parto oni povas aŭskulti la faman Sonorilon de Westminster „Big Ben”, la popularan arion „Tipperary” en la originala ĝazklasika interpreto de la New Orleans ĝazorkestro de Terry Lightfoot, la „Cent Sakflutoj” ludatan de la Skota Gvardio, la Marŝon n-ro 4 de Elgar ludatan de la Reĝa Filharmonia Orkestro sub la gvidado de Stanley Pope, kaj kanton en Esperanto (la skota melodio „Annie Laurie”) de la Temple Street Methodist junulara ĥoro.

La sonbendo estas eldonita en pluraj ekzempleroj, principe unu por ĉiu lando, kaj estas ricevebla mendante ĝin per simpla poŝtkarto al: 46-a Universala Kongreso de Esperanto, Harrogate (Britujo). La disponigo de la sonbendo okazas senpage, sed kontraŭ promeso ne reteni la sonbendon pli ol unu semajnon kaj sendi ĝin je propra zorgo al venonta utiliganto laŭ instrukcioj de la Kongresa Oficejo. Farigo de kopioj de la kongresa sonbendo estas permesata.

46-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Loka Kongresa Komitato

VI CERTE DEVAS POSEDI,
LEGI KAJ RELEGI JENAJN LIBROJN:

Fabiola

LA EKLEZIO EN LA KATAKOMBOJ

Verkis Kardinalo Wiseman.

Tradukis E. Ramo,

19 × 14.5 cm, 438 dense presitaj paĝoj,
multaj ilustraĵoj.

Dum konkurso la verko akiris premion pro la mirinde bona Esperanto-stilo; tial ni ankaŭ povas rekomendi ĝin al ĉiuj, kiuj deziras perfektigi sian scion pri Esperanto.

Prezo: en tola bindo kun oraj surpresoj f 8,50 = 34 steloj
 fortike broŝurita f 5,00 = 20 steloj

Quo vadis

ROMANO EL LA TEMPO DE NERO

la famkonata verko de Henryk Sienkiewicz,
el la pola originalo tradukis Lidia Zamenhof. 20.5 × 14.5 cm, 717 paĝoj.

Ĉi tiu vere elstara verko estas destinita nur por maturaj legantoj.

Prezo: en tre forta tola bindo f 12,00 = 48 steloj
 broŝurita f 9,50 = 38 steloj

Mendoj kaj pagoj: Por Nederlando: S-no A. M. Sinnema-de Vetten, Oostdorperweg 88, WASSENAAR, Nederl. poŝtkonto 621490.

Por aliaj landoj: F-ino Truus Durenkamp, Frederikstraat 2, DORDRECHT, Nederlando, poŝtkonto 214009, aŭ al niaj landaj reprezentantoj; por plirapidigi la alsendon, sendu la mendon al DORDRECHT, kune kun pagatesto se vi pagis al landa reprezentanto.

Kontaktorgano de „LA ALTA FLUGO’

birdo

INTERNACIA MONATA GAZETO POR JUNAJ ESPERANTISTOJ

Ĉu vi jam konas ĝin? Ne? Tiukaze tuj abonu ĝin!!!

Ĉar „ B I R D O ”

- enhavas varian kaj interesan legaĵon por vi!
- flugas jam al 25 landoj en la tuta mondo!
- estas facile legebla, ĉar ĝiajn artikolojn verkas grandparte la gejunuloj mem!
- taŭgas tial ne nur por gejunuloj, sed precipe ankaŭ por komencantoj!
- estas LA monata revuo por la junaj esperantistoj!
- estas leginda, legenda kaj legata de ĉiu, kiu havas junan koron (kaj kiu ESPERANTISTO ne havas tian?)!
- estas VIA gazeto!
- kostas **nur 12 stelojn po jaro!** (Tio egalas al 3 skatoletoj da cigaredoj aŭ 2 pecoj da ĉokolado!)

Tial tuj petu prov-ekzempleron ĉe la administracio kaj abonu „BIRDON” plej baldaŭ!!! Ju pli multe da legantoj ĝin subtenas, des pli bela ĝi fariĝas!

„ B I R D O ” — kontaktorgano de „LA ALTA FLUGO”

Redaktoro: Stefan Maul, Bismarckpl. 2, REGENSBURG, Germanujo.

Administracio kaj korespondo: Hub. Weltens, poŝtfako n-ro 8, SCHOONHOVEN, Nederlando.

Poŝtkonto: 180800, Admin. Espero-Junulargazeto „Birdo”, Postfako 8, SCHOONHOVEN, Nederlando.

Abonkotizo: 12 steloj = 10 internaciaj respondkuponoj = 3 nedl. guldonoj = 3,40 germ. markoj = 1 dolaro.

Niaj reprezentantoj:

Belgujo: J. M. Geron, Rue du Marteau 119, VERVIERS

Germanujo: H. Thönnessen, poŝtf. 294, STOLBERG/RHL.p.k.Köln134686

Italujo: F. Galbusera, Vicolo Ghiacciaia 6, VERONA

Pollando: R. Skalinski, Str. Szezytna 6, TORUN.

**„BIRDO” FLUGU ANKAŬ AL VI!
ABONU ĜIN NEPRE PLEJ BALDAŬ!**